

# KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

[www.ueci.it](http://www.ueci.it)

“Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue” (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -  
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -  
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62  
stampato da **atena.net** - Grignano di Zocco (VI)

Anno 95 - n. 5  
SETTEMBRE - OTTOBRE 2016

## 69-a IKUE-kongreso

Nitra (Slovakio) – 16/23 Julio 2016

Al la ĉijara kongreso aliĝis 51 homoj el 16 landoj, sed pro diversaj kialoj, povus partopreni nur kvardeko da ili. Inter ili du pastroj, Serhij Prudko el Ukrainio kaj Maryus Dyglys el Litovio, kiuj celebris la ĉiutagajn mesojn. Kvin italoj aliĝis sed nur du povis partopreni.

Temo de la kongreso estis en jubilea etoso: *Vizaĝo de Mizerikordo*.

La kongresejo, ĉe la Porpastra Seminario, bone taŭgis al la celo. La kongreso, tre bone organizita de Marjia Belošević, disvolviĝis glate laŭ la programo, kiu alternis momentojn de prelegoj, preĝado, muziko kaj pilgrimado. Jam de la unua tago (dimanĉo), post la matenaj prelegoj, ni vizitis la Katedralon de Nitra kaj la apudan Diocezan Muzeon. La postan tagon (lundon) okazis tuttaga pilgrimo: matene al la Sanktejo de Marianka kaj posttagmeze en Bratislavo, kie ni renkontiĝis kun la fratoj de KELI tie kongresantaj, kaj kune, ni vizitis la urbon, vespermanĝis kaj ĝuis folkloran spektaklon. Mardon, post la matenaj prelegoj, ni pilgrimis piede al Kalvaria monto de Nitra por kalvaria vojo-preĝo kaj vizito de la apuda misiista muzeo. Merkredon, post la matenaj prelegoj, ni veturis al Trnava, ĉarma turisma urbeto en kies katedralo niaj pastroj celebris S-ktan meson. Ĵaŭdon matene ni vizitis la Sinagogon de Nitra kaj vespere ni spektis orgenkoncerto de Stefan Lepping

en la apuda preĝejo de S-ktaj Petro kaj Paŭlo. Vendredo estis dediĉita al prelegoj; vespere vizitis nin Mirejo Grosjean, estrino de Ilel, kiu raportis pri sia vojaĝo en Armenio kaj ties preĝejoj. Fine okazis la nemalhavebla adiaŭa vespero, ĉifoje riĉigita de la ĉeesto de grupo de meksikaj studentinoj, kiuj, hazarde, dum sia vojaĝo al Krakovo por la Monda Tago de la Junularo haltis ĉe nia kongresejo.

Ni ŝuldas apartajn dankojn kaj gratulojn al tiuj, kiu multe laboris por ĝia sukceso, ĉefe al nia vic-prezidantino Marjia Belošević.



Giovanni kaj Felice antaŭ la kastelo de Bratislava

## La storia del Giubileo

**(Relazione di fra Pierluigi Svaldi  
per il 30° congresso UECl)**

*(prima parte)*

Con il suo motto “*Miserando atque eligendo*” (compatito ed eletto) papa Francesco porta nella Chiesa un vento di novità, che sorprende tutti.

Dal motto si deduce che il papa, in gioventù, si sentiva considerato con misericordia infinita e persino essere eletto anche al di là di ogni aspettativa. Per questo egli ripropone continuamente la misericordia come l’attenzione costante di Dio all’umanità confusa. Egli è anche istruito da papa Giovanni XXIII, che nella “*Gaudet Mater Ecclesia*” scrisse “*La sposa di Cristo preferisce usare la medicina della misericordia invece che imbracciare le armi del rigore*”. Così egli riesce a dire cose nuove e cose antiche rimanendo nella continuità storica della Chiesa. “*Questo è il tempo della misericordia. È importante che i fedeli laici la vivano e la portino nei diversi ambienti sociali!*”. L’attuale Giubileo della Misericordia, iniziato l’8 dicembre 2015, e che durerà fino al 20 novembre 2016, ben si inserisce nella storia di Dio che guarda con misericordia e sceglie gratuitamente.

La Chiesa degli ultimi sette secoli (dal 1200 al 2000) ha cercato di evidenziare la bontà misericordiosa di Dio attraverso una serie di Anni Santi ordinari o proclamati in occasione di particolari circostanze, cioè per ottenere un aiuto particolare in momenti difficili della Chiesa o per celebrare occasioni solenni. Ne sono stati celebrati più di novanta, di durata variabile. Memorabili quelli della Redenzione del 1933 e del 1983, che ebbero valore universale; sono durati un intero anno e sono stati accompagnati dall’apertura delle Porte Sante.

## Historio de la Jubileo

**(Prelego de frato Pierluigi Svaldi  
dum la 30-a UECl-kongreso)**

*(unua parto)*

Per sia devizo: “*Miserando atque eligendo*” (kompatita kaj elektita) papo Francisko kunportas en la Eklezion venton de novaĵo, kiu mirigas ĉiujn.

El la devizo oni deduktas, ke la papo, jun-aĝe, sentis sin konsiderata kun senfina mizerikordo kaj eĉ elektita ankaŭ preter ĉia atendo. Pro tio li daŭre reproponas la mizerikordon kiel la konstantan atenton de Dio al la konfuzita homaro. Li estis ankaŭ instruita de papo Johano la 23-a, kiu en “*Gaudet Mater Ecclesia*” skribis: “*La edzino de Kristo preferas uzi la kuracilon de la mizerikordo anstataŭ enbrakigi la armilojn de rigoreco*”. Tiel li sukcesas diri novaĵojn kaj antikvaĵojn plurestante en la historia kontinueco de la Eklezio. “*Tiu-ĉi estas la tempo de la mizerikordo. Estas grave ke la laikaj fideluloj ĝin vivu kaj ĝin kunportu en la plurajn sociajn mediojn*”. La nuntempa Jubileo de la Mizerikordo, komenciĝinta la 8an de decembro 2015, kaj kiu daŭros ĝis la 20a de novembro 2016, bonege enmetiĝas en la historion de Dio, kiu mizerikorde rigardas kaj senpage elektas.

La Eklezio de la lastaj sep jarcentoj (de la jaro 1200 ĝis la 2000) serĉadis evidentigi la mizerikordan bonecon de Dio per sinsekvo de ordinaraj Sanktaj Jaroj proklamitaj okaze de apartaj okazintaĵoj, tio estas por obteni apartan helpon dum malfacilaj momentoj de la Eklezio aŭ por celebri specialajn eventojn. El ĉi-tiuj oni kalkulas pli ol 90, je varia daŭro. Estas memorindaj tiuj de la Redemptiĝo en la jaroj 1933a kaj 1983a, kiuj havis universalan valoron; ili daŭris tutan jaron kaj estis akompanataj de la malfermoj de Sanktaj Pordoj.

Il Giubileo indetto da Papa Francesco è il primo Giubileo “tematico” della storia, dedicato alla Misericordia, ed è un Giubileo straordinario, cioè non legato allo scorrere del tempo.

Il giubileo prende il nome dallo strumento (o corno – *jobel*) che ogni 49 anni veniva suonato nelle culture del vicino Oriente e nel mondo ebraico per richiamare (*jobil*) la gente e per dichiarare santo il cinquantesimo anno, proclamando la remissione (*jobal*) totale. Allora ognuno poteva riavere quanto perduto nel corso degli ultimi 49 anni. Gli uomini, spesso costretti ad affrontare fortune e sfortune, abbisognavano della speranza di riottenere le loro proprietà di partenza e le libertà originali (vendute a suo tempo per urgenti necessità). Anche gli affitti erano calcolati sul numero di anni disponibili fino al successivo giubileo.

Nel mondo cattolico la tradizione dell’Anno Santo è iniziata nel 1300 con papa Bonifacio VIII che lo propose come secondo giubileo, portando dei documenti successivamente non riconosciuti dalla storia. Si deve dire che l’esperienza del completo perdono era già diffuso in Santa Maria degli Angeli per iniziativa di San Francesco di Assisi, che già lo aveva richiesto nell’anno 1216 e lo ottenne per il due di agosto di ogni anno.

L’evento del primo Anno Santo fu una ondata di spiritualità, di perdono, di fratellanza che si stava diffondendo in tutta la cristianità in contrapposizione agli odi e alle violenze

La Jubileo anoncita de papo Francisko estas la unua “tema” Jubileo de la historio. De diĉita al la Mizerikordo, ĝi estas eksterordinara Jubileo, tio estas, ne ligita al la fluado de la tempo.

La Jubileo prenas sia nomon el la instrumento (aŭ korno – *jobel*), kiu ĉiun 49an jaron estis ludata laŭ la kulturoj de la apuda Oriento, precipe en la juda mondo, por alvoki (*jobil*) la homojn kaj por deklari sanktan la 50an jaron, proklamante la tutan pardonon (*jobal*). Tiam ĉiuj rajtis rehavi ĉion, kio estis de ili perdita dum la daŭro de la lastaj 49 jaroj. La homoj, ofte devigitaj alfronti fortuneojn kaj malbonŝancojn, bezonis la esperon reakiri siajn iamajn propraĵojn kaj la originajn liberecojn (venditajn siatempe pro urĝaj necesoj). Eĉ la lupagoj estis kalkulitaj laŭ la nombro de disponeblaj jaroj ĝis la sekvanta Jubileo.

En la katolika mondo la tradicio de la Sankta Jaro ekis en la jaro 1300a kun papo Bonifacio la 8-a, kiu proponis ĝin kiel duan jubileon, alportante pri tio dokumentojn ne poste rekonatajn de la historio. Oni devas diri ke la sperto de la plena pardono estis jam disvastiĝinta en Sankta Maria de la Anĝeloj pro iniciato de Sankta Francisko el Asizo, kiu jam ĝin petis en la jaro 1216a kaj ĝin akiris por la dua de Aŭgusto de ĉiu jaro.

La okazo de la unua Sankta Jaro estigis ondegon de spiritualeco, de pardono, de frateco, kiu estis disvastiĝanta tra la tuta kristanaro en kontraŭstaro al la malamoj kaj al la



## BONIFATIUS VIII

che dominavano alla fine del 1200. Nel dicembre del 1299 è iniziata a circolare una voce, secondo la quale nell'anno centenario i visitatori della basilica di San Pietro avrebbero ricevuto una "pienissima remissione dei peccati". Questo ha fatto affluire a Roma tantissimi pellegrini per cui papa Bonifacio VIII pensò di concedere l'indulgenza per tutto l'anno 1300, riproponibile in seguito ogni cento anni. In questo primo Giubileo arrivarono a Roma Dante, Cimabue, Giotto, Carlo di Valois, fratello del re di Francia, con sua moglie Caterina.

Alcuni anni dopo il papa si trasferì ad Avignone (1305-77). Questo fece aumentare le richieste, affinché il secondo Giubileo venisse indetto già nel 1350 e non nel 1400. Papa Clemente VI accettò, fissò la scadenza ogni 50 anni, oltre alle basiliche di san Pietro e di san Paolo fuori le mura aggiunse quella di san Giovanni in Laterano. Di lì a poco, papa Urbano VI decise di fissare la cadenza ogni 33 anni (vita terrena di Gesù), disposizione mai osservata. Il nuovo papa, Bonifacio IX, celebrò l'Anno Santo nel 1390, ma dovette indirne uno nuovo nel 1400 a causa del forte afflusso di pellegrini verso la fine del secolo.

L'Anno Santo successivo fu indetto nel 1425 da Martino V, che fece coniare per la prima volta la medaglia commemorativa e aprì la Porta Santa a San Giovanni in Laterano. Nel 1433 non fu indetto nessun giubileo, celebrato invece nel 1450. Paolo II, con una Bolla del 1470, stabilì che in futuro il Giubileo si svolgesse ogni 25 anni. Così Sisto IV indisse il giubileo nel 1475, abbellendo Roma con nuove opere, come la Cappella Sistina e il ponte Sisto sul Tevere chiamando i più grandi artisti dell'epoca: Verrocchio, Signorelli, Ghirlandaio, Botticelli, Perugino, Pinturicchio, Melozzo da Forlì.

*(la seconda parte a pag. 12)*

perfortoj, kiuj superregis je la fino de la 13-a jarcento. En decembro de la jaro 1299a ekis rondiranta voĉo, laŭ kiu en la centa jar-reveno la vizitantoj de la Baziliko de Sankta Petro ricevintus "plenplenan pardonon de la pekoj". Tiu ĉi voĉo alvenigis al Romo amason da pilgrimantoj, pro tio papo Bonifacio la 8-a konvinkiĝis koncedi indulgencon por la tuta jaro 1300a, reproponeblan poste ĉiun centon da jaroj. Dum ĉi tiu unua Jubileo alvenis al Romo Dante, Cimabue, Giotto, Charles de Valois, frato de la franca reĝo, kun sia edzino Chaterine.

Post kelkaj jaroj la papo transloĝiĝis al Avignone (1305-77). Tio pliigis la peton, por ke la dua Jubileo estu anoncata en la jaro 1350a kaj ne en la 1400a. Papo Klemento la 6-a akceptis, difinis la limdaton je ĉiu 50a jaro, aldonante al la Bazilikoj de S-akta Petro kaj de S-akta Paŭlo ekster la Muregoj, tiun de Sankta Johano en Laterano. Iom poste papo Urbano la 6-a decidis kadencigi la Jubileon je ĉiu 33a jaro (surtera vivo de Jesuo), dispozicio neniam observata. La nova papo Bonifacio la 9-a celebris la S-aktan Jaron en 1390a, sed li devis anonci iun novan en 1400a, pro la alfluego de pilgrimantoj ĉe la jarcenta fino.

La sekvanta Sankta Jaro estas anoncita en la jaro 1425a de Martino la 5-a, kiu stampigis unuafoje memorigan medalon kaj malfermis la S-aktan Pordon en S-akta Johano en Laterano. En 1433a neniu Jubileo ekestis, sed oni celebris ĝin en 1450a. Paŭlo la 2-a, per bulo de 1470a decidis ke la estontaj Jubileoj disvolviĝu ĉiun 25a jaron. Tiel Sisto la 4-a anoncis la Jubileon en la jaro 1475 riĉiĝante Romon per novaj artaĵoj, kiel la Sistina kapelo kaj la ponto Sisto sur la rivero Tiberio, alvokante la plej grandajn tiamajn artistojn: Verrocchio, Signorelli, Ghirlandaio, Botticelli, Perugino, Pinturicchio, Melozzo el Forlì.



*(la dua parto je la 12-a paĝo)*



## MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

### LA MISERICORDIA E IL MALE

Il mondo è pieno di dolori, di violenze, di morti innocenti. In ogni persona si moltiplicano le domande: «Dio dove sei? Dov'è la tua misericordia? Perché tanto dolore innocente? Perché il male ci avvolge nella paura che contagia tutti?».

Qualcuno scrive affermando che tutte le guerre più importanti sono nate dalla religione, e suggerisce a tutti di dare la preferenza a una religione tutta personale.

Simone Weil, alle pagine 104-105 del suo libro "L'amore di Dio", ci dona questa riflessione a proposito del male nel mondo. A ogni passaggio ci metto del mio.

*«Il male del mondo, che noi vediamo dovunque sotto forma di infelicità o di delitto, è un segno della nostra distanza da Dio. Ma questa distanza è amore e come tale deve essere amata».*

Il male che portiamo dentro e quello che ci attornia ogni giorno ci impedisce di sentirci pari a Dio, pur sentendo di essere stati creati a sua immagine e somiglianza.

*«Non dico che si debba amare il male. Ma bisogna amare Dio attraverso il male. Quando un bambino, giocando, rompe un oggetto prezioso, la madre non è contenta di questa distruzione. Se in seguito il figlio va lontano o muore, la madre ripenserà a quell'incidente con una tenerezza infinita e vedrà in esso soltanto una manifestazione dell'esistenza del suo bambino. In tal modo noi dobbiamo amare Dio attraverso tutte le cose buone o*

### LA MIZERIKORDO KAJ LA MALBONO

La mondo estas plena de doloroj, de perfortoj, de senkulpaj mortintoj. En ĉiu homo multiĝas la demandoj: «Dio, kie vi estas? Kie estas via mizerikordo? Kial tiom da senkulpa doloro? Kial la malbono ĉirkaŭas nin per la timo, kiu kontaĝas ĉiujn?».

Kelkiuj skribas, asertante, ke ĉiuj pli gravaj militoj naskiĝis el la religio, kaj sugestas ke ĉiuj donu sian preferon al tute persona religio.

Simone Weil, je la paĝoj 104-105 de sia libro "La amo de Dio", donas al ni ĉi tiun priksideron pri la malbonon en la mondo. Post ĉiu paragrafo mi aldonos ion mian.

*«La malbono de la mondo, kiun ni vidas ĉie sub formo de malfeliĉo aŭ de delikto, estas signo de nia distanco de Dio. Sed ĉi tiu distanco estas amo kaj, kiel tia, ĝi devas esti amata».*

La malbono, kiun ni portas ene kaj kiu ĉiutage ĉirkaŭas nin, malebligas al ni senti nin samrangaj kiel Dio, ankaŭ se ni konscias esti kreitaj laŭ liaj imago kaj simileco.

*«Mi ne diras ke oni devas ami la malbonon. Sed oni devas ami Dion per la malbono. Kiam infano, ludante, rompas altvaloran objekton, la patrino ne estas kontenta pri ĉi tiu detruo. Se en posta tempo la filo iras malproksimen aŭ mortas, la patrino repripensos tiun okazintaĵon kun senlima tenereco kaj vidos en ĝi nur manifestadon de la ekzisto de sia infano. En tia maniero ni devas sendistinge ami Dion pere de ĉiuj aĵoj*

*cattive, indistintamente».*

Dio permette che noi siamo diversi da lui, diversi dal bene, affinché noi coltiviamo il desiderio di essere come lui.

*«Finché amiamo Dio nelle cose buone, ci illudiamo soltanto di amarlo; in realtà amiamo qualcosa di terreno a cui diamo il nome di Dio».*

L'amore, quando è vantaggioso per noi, non ci obbliga a uscire dal nostro piccolo mondo pieno di illusioni e vanità.

*«Non dobbiamo tentare di trasformare il male in bene, cercando dei compensi o delle giustificazioni al male. Dobbiamo amare Dio attraverso il male che c'è nel mondo unicamente perché tutto quello che avviene è reale e dietro ogni realtà si trova Dio. Certe realtà sono più o meno trasparenti; altre sono del tutto opache, ma dietro ad ognuna di esse, senza distinzione, c'è Dio».*

In noi permane il pericolo di credere più alle nostre sensazioni che ai fatti e agli avvenimenti della vita e della società. Per noi è importante portare la propria anima attraverso le prove e le difficoltà della vita.

*«Noi dobbiamo esclusivamente preoccuparci di volgere i nostri sguardi verso il punto in cui egli si trova, sia o no visibile. Se non vi fosse nessuna realtà trasparente, non avremmo nessuna idea di Dio. Ma se tutte le realtà fossero trasparenti, noi ameremmo soltanto la sensazione della luce divina e non Dio. Quando non vediamo Dio, quando la realtà di Dio non appare sensibilmente ad alcuna parte della nostra anima, per poterlo amare dobbiamo sforzarci di uscire da noi stessi. Questo significa amare Dio».*

È troppo importante rivolgere lo sguardo verso qualcuno che ci attende: questo ci permette di vivere fino all'ultimo respiro, consegnando tutto: *«Padre, nelle tue mani affido il mio spirito»* (Lc 23, 46).

*bonaj aŭ malbonaj»*

Dio permesas, ke ni estas malsimilaj de Li, malsimilaj de la bono, por ke ni flegu la deziron esti kiel Li.

*«Dum ni amas Dion en la bonaj okazintaĵoj, ni nur iluziigas ami Lin; fakte ni amas ion surteran, kion ni nomas Dio».*

La amo, kiam ĝi estas profitdona por ni, ne devigas nin eliri el nia malgranda mondo plenplena de iluzioj kaj vantecoj.

*«Ni ne devas klopodi transformi la malbonon en bonon, serĉante kompensojn aŭ pravigojn al la malbono. Ni devas ami Dion per la malbono, kiu estas en la mondo, nur ĉar ĉio, kio okazas, estas reala kaj malantaŭ ĉiu realaĵo troviĝas Dio. Kelkaj realaĵoj estas pli aŭ malpli travideblaj; aliaj estas absolute netravideblaj sed malantaŭ ĉiu el ili, sendistinge, ĉeestas Dio»*

En ni persistas la risko kredi pli al niaj sensacioj ol al la faktoj kaj la okazaĵoj de la vivo kaj de la socio. Por ni estas grava afero porti nian animon tra la elprovadoj kaj malfacilaĵoj de la vivo.

*«Ni devas ekskluzive klopodi turni nian rigardon direkte al la punkto, ĉu videbla, ĉu nevidebla, en kiu Li troviĝas. Se neniam realaĵo estus travidebla, ni havus nenian ideon pri Dio. Sed se ĉiuj realaĵoj estus travideblaj, ni amus nur la sensacion de la dia lumo kaj ne Dion. Kiam ni ne vidas Dion, kiam la realaĵo de Dio ne aperas en ian parton de nia animo, ni devas strebi eliri el ni mem por povi ami Lin. Ĉi tio signifas ami Dion».*

Estas tre grava afero direkta la rigardon al iu, kiu atendas nin: ĉi tio permesas al ni vivi ĝis la lasta spiro, transdonante ĉion: *«Patro, en viajn manojn mi transdonas mian spiriton»* (Lk 23, 46).

# *Dirite inter ni...*



050

## ALIGŔO AL LA KURSO

- Esperanto-Centro!
- Halo, mi telefonas, ĉar mi deziras informojn.
- Mi estas je via dispono.
- Mi dezirus viziti kurson de Esperanto.
  
- Bone, sed vi jam parolas Esperanton, laŭ tio, kion mi aŭdas.
- Jes, mi studis memlernante.
- Gratulojn.
- Dankon.
- Nu, diru al mi, kion vi deziras precize.
  
- Mi estas universitata studento kaj mi dezirus pliperfektigi mian konon pri Esperanto.
- Kiucele?
- Mi dezirus fari ĉiujn eblajn ekzamenojn por esti eventuale preta instrui la lingvon.
  
- Bona ideo, sed vi scias, ke nuntempe ekzistas nenia leĝo pri la ebleco instrui Esperanton en la italaj lernejoj?
- Tion mi scias, tamen mi estas antaŭvidema.
- En ordo: mi povas diri al vi, ke Itala Instituto de Esperanto kaj ILEI, kiu estas la Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj, organizas kursojn kaj ekzamenojn por la akiro de la diplomo, kiu rajtigas la instruadon de la lingvo.
- Tio interesas al mi.
- Nu, vi jam kapablas paroli la lingvon, sed mi ne scias, ĉu vi konas bone ĝin laŭ la skriba vidpunkto.
- Mi korespondas kun kelkaj eksterlandaj amikoj.

## ISCRIZIONE AL CORSO

- Centro Esperantista!
- Salve, telefono perché desidero delle informazioni.
- Sono a sua disposizione.
- Desidererei frequentare un corso di Esperanto.
- Bene, ma lei parla già Esperanto da quello che sento.
- Sì, ho studiato da autodidatta.
- Congratulazioni.
- Grazie.
- Bene, mi dica che cosa desidera con precisione.
- Sono uno studente universitario e desidererei migliorare la mia conoscenza dell'Esperanto.
- A che scopo?
- Desidererei fare tutti gli esami possibili per essere eventualmente pronto a insegnare la lingua.
- Buona idea, ma sa che attualmente non esiste alcuna legge circa la possibilità di insegnare l'Esperanto nelle scuole italiane?
- Questo lo so, tuttavia sono previdente .
- D'accordo, le posso dire che l'Istituto Italiano di Esperanto e l'ILEI, cioè la Lega internazionale degli Insegnanti di Esperanto, organizzano corsi ed esami per acquisire il diploma che abilita all'insegnamento della lingua.
- Questo mi interessa.
- Bene, lei sa già parlare la lingua, ma non so se la conosce bene dal punto di vista dello scritto.
- Faccio corrispondenza con alcuni amici all'estero.

- Ankaŭ tio estas bona.
- Kion vi konsilas al mi?
- Por bone konsili vin, mi devus rekte paroli kun vi.
- Tion oni povas aranĝi.
- Ĉu vi loĝas en Milano?
- Ne, mi ne loĝas en Milano. Mi loĝas apud Monza.
- En tiu okazo vi ne havus malfacilaĵojn por atingi Milanon.
- Preskaŭ ĉiun tagon mi estas en Milano pro la Universitato.
- Ĉu vi vizitas la Statan?
- Jes, la Statan.
- Tio signifas, ke vi estas apud la centro de la urbo.
- Jes
- Nia Centro ankaŭ estas urbo-centre.
- Kie ĝi situas?
- En Placo Duomo n. 16.
- Ĉu apud la Katedralo?
- Flanke de la Katedralo. Dekstre se oni alrigardas la ĉefan fasadon.
- Ĉu post la Muzeo de Duomo?
- Precize. En la Palaco de la Ĉefepiskopejo.
- Nu, fronte al la flanka enirejo de Duomo.
- Jes.
- Ĉu estas tie pordgardisto?
- Jes, estas pordogardisto.
- Kaj mi devas peti pri la Centro de Esperanto.
- Jes, ĝi troviĝas teretaĝe, pordo n.ro 7.
- Kiam mi povas veni?
- Lunde, de la 18.00 ĝis la 19.00, merkrede je la sama horo kaj sabate de la 3.00 ĝis la 5.00 posttagmeze.
- Ĉu mi povos paroli kun vi?
- Jes, se vi volas, ankaŭ mi estos tie.
- Bonege. Ĝis la revido.
- Ĝis la revido.
- Anche questo va bene.
- Che cosa mi consiglia?
- Per consigliarla bene, dovrei parlarle direttamente.
- Questo lo si può combinare.
- Abita a Milano?
- No, non abito a Milano. Abito vicino a Monza.
- In tal caso non avrebbe difficoltà per raggiungere Milano.
- Sono quasi ogni giorno a Milano per l'Università.
- Frequenta la Statale?
- Sì, la Statale.
- Questo significa che si trova vicino al centro-città.
- Sì.
- Il nostro Centro è anche nel centro della città.
- Dove si trova?
- In Piazza Duomo n. 16.
- Vicino alla Cattedrale?
- Di fianco alla Cattedrale. A destra se si guarda verso la facciata principale.
- Dopo il Museo del Duomo?
- Precisamente. Nel palazzo dell'Arcivescovado.
- Allora di fronte all'entrata laterale del Duomo.
- Sì.
- C'è un portiere?
- Sì, c'è un portiere.
- Ed io devo chiedere del Centro di Esperanto.
- Sì, si trova a pianterreno, porta numero 7.
- Quando posso venire?
- Lunedì, dalle 18.00 alle 19.00. il mercoledì, alla stessa ora e il sabato dalle tre alle cinque del pomeriggio.
- Potrò parlare con lei?
- Sì, se vuole, ci sarò anch'io.
- Benissimo. Arrivederci.
- Arrivederci.



\*\*\*

- Bonan vesperon.
- Bonan vesperon. Kion vi deziras?
- Mi estas tiu, kiu telefonis antaŭ kelkaj tagoj.
- Por kio vi telefonis?
- Mi telefonis por ricevi informojn pri la kursoj kaj pri la ekzamenoj de Esperanto.
- Ha, jes, mi memoras.
- Ĉu estis vi ĉe la telefono?
- Jes, estis mi ĉe la aparato.
- Ĉu mi povas paroli kun vi?
- Mi estas je via dispono
- Mi deziras viziti la kurson de Esperanto.
  
- Tion mi scias, ĉar vi diris, kiam vi telefonis. Vi ankaŭ diris, ke vi studis memlernante.
- Jes, mi studis memlernante
- Gratulojn. Denove mi gratulas vin, ĉar vi bone lernis la lingvon.
  
- Dankon.
- Nu, diru al mi, vi volus scii ion pri la ekzamenoj.
- Jes, ĉar mi komprenis, ke mi povus prezenti mian kandidatiĝon por la unua ekzameno.
- Vi pravas.
- Kiam okazos la unuaj ekzamenoj?
- La unuaj ekzamenoj okazos en monato Junio.
- Ĉu estas jam fiksita la dato?
- Ne, sed ili okazos en Julio, sabate, tre verŝajne la lastan sabaton de la monato.
  
- Tio estas interesa indiko, ĉar sabate mi estas ĝenerale libera.
  
- Efektive. ni organizas la ekzamenojn – se tio estas ebla – en tagoj dum kiuj oni

\*\*\*


- Buona sera.
- Buona sera. Che cosa desidera?
- Sono Quello che ha telefonato alcuni giorni fa.
- Per che cosa ha telefonato?
- Ho telefonato per avere informazioni sui corsi e sugli esami di Esperanto.
- Ah, sì, ricordo.
- Era lei al telefono?
- Sì, ero io all'apparecchio.
- Posso parlare con lei?
- Sono a sua disposizione.
- Desidererei frequentare un corso di Esperanto.
- Questo lo so, perché l'ha già detto quando ha telefonato. Ha anche detto che ha studiato da autodidatta.
- Sì, ho studiato da autodidatta.
- Congratulazioni. Mi congratulo nuovamente con lei, perché ha imparato bene la lingua.
- Grazie.
- Bene, mi dica, vorrebbe sapere qualcosa sugli esami.
- Sì, perché ho capito che potrei presentare la mia candidatura per il primo esame.
  
- Ha ragione.
- Quando avranno luogo i primi esami?
- I primi esami avranno luogo nel mese di giugno.
- È già stata fissata la data?
- No, ma avranno luogo in giugno, di sabato, molto verosimilmente l'ultimo sabato del mese
- Questa è un'indicazione interessante perché di sabato io sono generalmente libero
- Infatti, organizziamo gli esami – se è possibile – in giorni nei quali general-

- ĝenerale ne laboras.
- Nu, vi organizas ekzamenojn ankaŭ dimanĉe?
- Jes, kelkfoje, ekzemple kiam okazas triagradaj ekzamenoj.
- Pri kio temas?
- Temas pri ekzamenoj por fariĝi instruistoj de Esperanto.
- Kiam mi rajtos ekzameniĝi por rajti instrui Esperanton?
- Nu, ni iru laŭgrade: dum ĉi tiu jaro vi povus viziti la duagradan kurson.
- Kaj ekzameniĝi je la fino de la lerneja jaro.
- Jes, sed vi ekzameniĝos por ricevi la unuagradan diplomon.
- Kial?
- Ĉar estas devige havi la unuagradan diplomon por havi rajton aliĝi la dua-gradan ekzamenon.
- Ĉu estas regulo?
- Jes, estas regulo de la Itala Instituto de Esperanto. Kaj devas pasi almenaŭ ses monatoj inter unu ekzameno kaj la alia.

(daŭrigota)

- mente non si lavora.
- Ebbene, organizzate esami anche di domenica.
- Sì, qualche volta, ad esempio quando hanno luogo esami di terzo grado.
- Di che si tratta?
- Si tratta di esami per diventare insegnanti di Esperanto.
- Quando potrò essere esaminato per poter insegnare l'Esperanto?
- Bene, andiamo per gradi: durante quest'anno potrà visitare il corso di secondo grado.
- Ed essere esaminato alla, fine dell'anno scolastico.
- Sì, ma farà l'esame per ricevere il diploma di primo grado.
- Perché?
- Perché è obbligatorio avere il diploma, di primo grado per aver il diritto ad iscriversi all'esame di secondo grado.
- È una regola?
- Sì. è una regola dell'Istituto Italiano di Esperanto. E devono passare almeno sei mesi fra un esame e l'altro.

(continua)



# Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

## SETTEMBRE 2003

## SEPTEMBRO 2003

*Quando m'involerò tra le sfere celesti  
 questa visione chiuderò negli occhi:  
 quest'albero mutilato  
 di diversi suoi rami,  
 le cime verdi scapigliate,  
 discinte, disperate di spazi.  
 Questo pannello di cielo  
 celeste, tenero, sopra il mare blu  
 sparpagliato di pepite d'argento.  
 E te, piccolo ibisco ora verde,  
 dai grossi calici rossi caduchi,  
 effimeri di un sol giorno di vita,  
 che tanto ho abbeverato di acqua  
 e d'amore.  
 E voi siepi, e te,  
 agave gigante,  
 orgoglio del mio "Piccolo paradiso",  
 eremo, rifugio solare  
 di questi miei ultimi anni,  
 che declinano coi tramonti  
 d'ogni sera.*

Anna Amorelli Gennaro

*Kiam mi forflugos tra la ĉielaj sferoj  
 ĉi tiu vido fermiĝos en miaj okuloj:  
 ĉi tiu arbo detranĉita  
 de siaj pluraj branĉoj,  
 la verdaj pintoj distaŭzitaĵ,  
 ĉifonaj, senesperaj je spacoj.  
 Ĉi tiu panelo de ĉielo  
 lazura, milda, super la blua maro  
 disŝutita per arĝentaj ŝtonetoj.  
 Kaj vi, eta hibisko, nun verda,  
 kun dikaj ruĝkalikoj kadukaj,  
 efemeraj je unutaga vivo,  
 kiun mi tiom trinkigis per akvo  
 kaj per amo.  
 Kaj vi heĝoj, kaj vi,  
 giganta agavo,  
 orgojlo de mia "Eta paradizo",  
 ermitejo, suna ŝirmilo  
 de ĉi miaj lastaj jaroj,  
 malleviĝantaj kun la sunsubiroj  
 de ĉiu vespero.*

(esperantigis Norma Cescotti)

## La storia del Giubileo

*(Relazione di fra Pierluigi Svaldi  
per il 30° congresso UECl)*

*(seconda parte)*

Nel 1500 Alessandro VI volle che le porte Sante delle quattro basiliche venissero aperte contemporaneamente, riservando a sé l'apertura della Porta Santa di San Pietro.

Clemente VII aprì solennemente, il 24 dicembre 1524, il nono Giubileo, nel quale si cominciava ad avvertire la grande crisi che di lì a poco avrebbe investito l'Europa con la riforma protestante.

Ad indire il Giubileo per il 1550 fu Paolo III, ma ad aprirlo fu Giulio III. Il notevole afflusso di pellegrini provocò non pochi problemi di assistenza, a cui provvide in modo particolare San Filippo Neri con la "Confra-ternita della Santa Trinità".

Nel 1575, sotto il pontificato di Gregorio XIII, confluirono a Roma oltre 300.000 persone da tutta l'Europa.

I successivi Anni Santi del XVII secolo furono indetti da Clemente VIII (1600), Urbano VIII (1625), Innocenzo X (1650), Clemente X (1675).

Il Giubileo nel 1700 fu indetto da papa Innocenzo XII, che arricchì Roma con l'ospizio di san Michele a Ripa, una grande opera caritativa. Intanto, crescevano le iniziative per venire incontro alle esigenze dei pellegrini, come accadde anche nel 1725, sotto il pontificato di Benedetto XIII.

Predicatore instancabile nell'Anno Santo del 1750 (indetto da Benedetto XIV) fu il francescano San Leonardo da Porto Maurizio, che eresse nel Colosseo 14 edicole per il pio esercizio della Via Crucis e una grande croce in mezzo all'arena.

Clemente XIV promulgò il Giubileo dell'anno 1775, ma fu attuato dal nuovo ponte-

## Historio de la Jubileo

*(Prelego de frato Pierluigi Svaldi  
dum la 30-a UECl-kongreso)*

*(dua parto)*

En la jaro 1500a Aleksandro la 6-a volis ke la Sanktaj Pordoj de la kvar Bazilikoj estu samtempe malfermataj, rezervante por si la malfermon de la Pordo de S-akta Petro.

Klemento la 7-a solene malfermis la naŭan Jubileon la 29an decembro 1524a, dum kiu oni komencis percepti la grandan krizon kiu, post mallonge, sturme atakos Eŭropon kun la protestanta reformo.

Paŭlo la 3-a anoncis la Jubileon en la jaro 1550a, sed malfermis ĝin Julio la 3-a. La rimarkinda alfluo de pilgrimantoj kaŭzis plurajn asistad-problemojn, pri kiuj tute aparte prizorgis Sankta Filippo Neri per la "Pia Societo de la Sankta Triunuo".

En la jaro 1575a, sub la papregado de Gregorio la 13-a, kunfluis al Romo pli ol 300.000 homoj el la tuta Eŭropo.

La sekvantaj Sanktaj Jaroj de la 17-a jarcento estis anoncitaj de Klemento la 8-a (1600), Urbano la 8-a (1625), Innocenzo la 10-a (1650), Klemento la 10-a (1675).

La Jubileo de la jaro 1700a estas anoncita de papo Innocenzo la 12-a, kiu riĉigis Romon per la hospico de Sankta Miĥaelo en Ripa, granda karitata institucio. Novaj bonfaremaj iniciatoj favore de la pilgrimoj estis realigitaj en la jaro 1725a kun papo Benedikto la 13-a.

Senlaca predikisto dum la Sankta Jaro de la jaro 1750a (anoncita de Benedikto la 14-a), estis la franciskano S-akta Leonardo el Porto Maŭricio, kiu starigis en la Koloseo 14 klostrojn por monumenta krucvojo kaj grandan krucon meze de la areno.

La Jubileo de la jaro 1775a anoncita de Klemento la 14-a estis starigita de la nova

fice Pio VI.

La difficile situazione della Chiesa al tempo dell'egemonia napoleonica non permise a Pio VII di indire un Giubileo per il 1800. Oltre mezzo milione di pellegrini giunse a Roma nel giubileo del 1825 forse in seguito al crollo della Basilica di San Paolo fuori le Mura, distrutta da un incendio nell'anno 1823. Durante quel giubileo Leone XII spostò la Porta Santa nella basilica minore di Santa Maria in Trastevere. Le vicende della Repubblica Romana e del temporaneo esilio di Pio IX impedirono la proclamazione dell'Anno Santo del 1850. Lo stesso pontefice, il cui papato fu il più lungo della storia, circa 32 anni, indisse al suo posto quello del 1875, ma privato delle cerimonie di apertura e di chiusura della Porta Santa a causa dell'occupazione di Roma.

Papa Leone XIII indisse il ventiduesimo Giubileo all'inizio del XX secolo con sei beatificazioni e due canonizzazioni (quelle di San Giovanni Battista de La Salle e di Santa Rita da Cascia).

Nel 1925, Pio XI per guadagnare l'indulgenza propose di celebrare l'Anno Santo ponendo l'attenzione sul valore delle missioni e in favore della pace tra i popoli.

Nel successivo giubileo del 1950, Pio XII indicò le seguenti finalità:

- santificazione delle anime mediante la preghiera e la penitenza e l'incrollabile fedeltà a Cristo e alla Chiesa;
- azione per la pace e tutela dei Luoghi Santi;
- difesa della Chiesa contro i rinnovati attacchi dei suoi nemici e impetrazione della vera fede per gli erranti, gli infedeli e i senza Dio;
- attuazione della giustizia sociale e opere di assistenza agli umili e ai bisognosi.

L'ultimo Giubileo ordinario risale al 1975 e fu indetto da Paolo VI, che ne presentò sinteticamente gli obiettivi con i termini "Rinnovamento" e "Riconciliazione".

Il Grande Giubileo del 2000 è considerato

papa Pio la 6-a.

Pro la malfacila situacio de la Eklezio sub Napoleono, papa Pio la 7-a ne povis anonci la Jubileon de la jaro 1800a. Dum la Jubileo de la jaro 1825a alvenis al Romo pli ol duonmiliono da pilgrimoj eble sekve de la disfalo de la Baziliko de Sankta Paŭlo ekster la Muregoj, detruita de brulego en la jaro 1823a. Dum tiu Jubileo papa Leono la 12-a delokis la Sanktan Pordon al la pli malgranda Baziliko de Sankta Maria en Transtevere. La eventoj de la Romana Respubliko kaj de la portempa ekzilo de Pio la 9-a senrajtigis la anoncon de la Sankta Jaro de 1850a. La sama papa, kies papregado estis la plej longa de la historio, preskaŭ 32 jaroj, anoncis, anstataŭe, tiun de la jaro 1875a, sed sen ceremonioj por la malfermo kaj la fermo de la Sankta Pordo pro la okupado de Romo.

Papa Leono la 13-a anoncis la dudek duan Jubileon komence de la 20-a jarcento kun ses beatigaj kaj du kanonigaj proklamoj (tiu de S-akta Johano Baptisto el La Salle kaj de S-akta Rita el Cascia).

En la jaro 1925a papa Pio la 9-a, por gajni la indulgencon proponis celebri la Sanktan Jaron kun la atento al la valoro de la misioj kaj favore de la interpopola paco.

En la posta Jubileo de la jaro 1950a papa Pio la 12-a indikis la jenajn celojn:

- sanktigo de la animoj pere de la preĝo kaj la pentofaro kaj neskiebla fideleco al Kristo kaj al la Eklezio;
- porpaca agado, gardado de la Sanktaj Lokoj;
- defendo de la Eklezio kontraŭ la renovigitaj atakoj de ĝiaj malamikoj kaj elpeto de vera kredo por la vagantoj, la nekredantoj kaj la senreligiuloj;
- realigo de la socia justeco kaj bonfaraj agadoj favore de la humiluloj kaj bezonuloj.

La lasta ordinara Jubileo okazis en la jaro 1975a kaj ĝi estis anoncita de Paŭlo la 6-a, kiu sinteze prezentis la koncernajn celojn per la terminoj "Renovigo kaj Repaciĝo."

La Granda Jubileo de la jaro 2000a estas

straordinario per il valore della data e per l'impegno profuso per la sua celebrazione, benché celebrato nei limiti di tempo convenzionali.

Non sappiamo perché durante il primo millennio non si celebrarono Anni Santi. Tuttavia sappiamo che alla fine dell'anno 1000 c'erano molte attese dette "attese millenaristiche" con il detto "Mille e non più Mille" e la conseguente venuta di Cristo per il giudizio finale. Il rivolgersi agli Anni Santi era ed è una richiesta per ogni vita impegnata nella storia. L'inarrestabile flusso del tempo, infatti, ci obbliga a fissare dei limiti di tempo a misura d'uomo, per vivere con i due piedi sulla terra, ma con uno sguardo alla immensità di Dio. Quando si dice: "C'è più tempo che vita" ci riferiamo proprio a questo.

konsiderata eksterordinara pro la valoro de la dato kaj pro la sindevigo elverŝita en la celebrado, kvankam ĝi estis celebrita je konvenaj templimoj.

Ni ne scias kial dum la unua jarmilo oni ne celebris Sanktajn Jarojn. Ni, tamen, scias ke ĉe la fino de la jaro 1000a estas multaj atendoj nomataj "Jarmilismaj atendoj" kun la onidiro "Mil kaj ne plu Mil" kaj la sekvanta reveno de Kristo por la fina juĝo. La sinturno al la Sanktaj Jaroj estis kaj estas postulemo por ĉiu sindeviga vivo en la historio. La nehaltigebla fluo de la tempo, fakte, devigas nin fiksi tempolimojn je homa mezuro, por travivi kun ambaŭ piedoj sur la tero, sed kun la rigardo al la senlimo de Dio. Kiam oni diras "Estas pli da tempo ol da vivo" ni ĝuste celas tion.

## **83° Congresso della Federazione Esperantista Italiana**

*Frascati (Roma) 20-27 agosto 2016*



Quest'anno il congresso della F.E.I. si è svolto presso il Centro Giovanni XXIII di Frascati (RM) nella settimana dal sabato 20 al 27 agosto. Si sono iscritti 221 esperantisti di 24 diverse nazionalità (110 gli italiani tra cui una decina di UECEI-anoj). Tema del congresso di quest'anno era:

*“L'insegnamento delle lingue  
nelle scuole europee”*

Come al solito la manifestazione era ricchissima di eventi più disparati spesso contemporanei: seminari, corsi, spettacoli, musica, conferenze, esami dell'Istituto Italiano di Esperanto e soprattutto escursioni nelle principali località turistiche dei dintorni. Mercoledì 24 agosto un gruppo di esperantisti ha presenziato all'udienza del Papa che ha salutato i partecipanti al congresso esperantista. (Nella foto, sullo sfondo, si può vedere la nostra bandiera sventolare al passaggio del Papa). Non essendo disponibile un sacerdote esperantista, sabato 20, nella cappella del Centro Giovanni XXIII è stata celebrata una Santa Messa in Italiano con letture in esperanto e traduzione simultanea dell'omelia.



## ELEZIONE DEL NUOVO IKUE-ESTRARO

Durante il congresso di Nitra si sarebbe dovuto eleggere il nuovo estraro dell'IKUE. Si trattava di eleggere il presidente, cinque consiglieri e tre revisori dei conti. Purtroppo non si è potuto procedere alla elezione per mancanza di un numero sufficiente di candidati. Si ritiene che la causa principale sia dovuta al fatto che le candidature sono state sollecitate tramite *Espero Katolika*, l'organo ufficiale dell'IKUE, che negli ultimi tempi, a causa delle note vicende, ha perso numerosi abbonati. Quanto prima si provvederà a una più capillare campagna per sollecitare nuove candidature. Chi se la sente è pregato di candidarsi con spirito di servizio. È richiesta l'iscrizione all'IKUE da almeno 3 anni consecutivi, età di almeno 18 anni e una discreta conoscenza della lingua.

### NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2016

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO) .....	22,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG) .....	11,00 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF).....	11,00 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE).....	43,00 €
Associato sostenitore <i>senza Espero Katolika</i> (SS).....	44,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE).....	86,00 €
Solo abbonamento a <i>Katolika Sento</i> (AK) .....	10,00 €
Solo abbonamento a <i>Espero Katolika</i> (AE) .....	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte. I gruppi locali con almeno 10 soci trattengono 2,10 € per l'associato ordinario e 1,05 per l'associato giovane o familiare.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I*  
 codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di *Katolika Sento* è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

### COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

**Presidente:** Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S. Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – [katolika.sento@ueci.it](mailto:katolika.sento@ueci.it) (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

**Vice presidente:** Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

**Segretario/cassiere:** fra Pierluigi SVALDI, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

**Consulente culturale-religioso:** Ida BOSSI, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

**Responsabile dei congressi:** Giovanni CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormanò (MI) – tel. 02.66301958

**Consulente informatico:** Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

**Consulente editoriale:** Carlo SARANDREA, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

**Addetto alla logistica:** Felice SOROSINA, Via Sarnico 17, 24060 Tavernola (BG) – tel. 035.932298 –

**Assistente Ecclesiastico:** mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di *Katolika Sento* vanno spedite al presidente UECI.

# AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el [www.gioba.it](http://www.gioba.it)) - sendis Tiziana Fossati)

## Precizeco

Matematikisto atinginte la hotelon por feriado rimarkas, ke li forgesis hejme sian poŝtelefonon, pro tio li sendas ĉiu tiun ret-mesaĝon al sia edzino:

«Karega ĉi tie ĉio bone. Via bagaĝo estas jam preta en la ĉambro, pro tio vi povos veni sen aliaj zorgoj la venontan sabaton. Nur unu aferon mi petas de vi. Bonvolu porti al mi **vian** poŝtelefonon. Mi intence skribas "**vian** poŝtelefonon" ĉar se mi skribus "**mian**" vi legos ĝin kiel **mian** kaj tiam vi kunportos al mi **vian** poŝtelefonon. Sed mi tute ne bezonas **vian** poŝtelefonon! Tial mi precizigas kaj skribas "**vian** poŝtelefonon", por ke vi legu "**vian** poŝtelefonon" kaj portu al mi **mian** poŝtelefonon.»

## Honestulo

Pogranda komercisto, pasigas siajn feriojn en ĉarma urbeto, kie loĝas kelkaj komercistoj liaj klientoj. Post iom da tagoj, parolante kun unu el siaj klientoj, li diris:

– Via urbo estas bona nur por ripozo, sed ne por negocado. Mi kontrolis, kaj trovis, ke el ĉiuj miaj klientoj, nur unu estas honesta.  
– Ĉu nur unu? Nekredeble!  
Ĉu vi povas diri al mi, kiu li estas!?

\*\*\*

## Pentristo 1

– Kion plej placas al vi de mia pentraĵo?  
– Ĝia kadro.

\*\*\*

## Pentristo 2

– Ĉu vere vi pentris ĉi tion?  
– Jes, Ja.  
– Estu trankvila, al neniu mi diros tion.

## Advokata konsilo

– Homo eniras oficejon de advokato:  
– Mi volus peti konsilon de vi... Kiaj estas viaj tarifoj?  
– Dek kvin eŭrojn por ĉiu demando.  
– Ĉu tio ne estas tro multekosta?  
– Eble jes. Kio do estas via tria demando?

\*\*\*

## Kuracista konsilo

– Mi petis konsilon al la kuracisto por mia edzo, ĉar li trinkas tro da vino, kaj li konsilis al mi meti ĉi tiujn gutojn en lian kafon.  
– Kaj nun? Ĉu li plu ne trinkas vinon?  
– Ne: li plu ne trinkas kafon.

\*\*\*

## Edukista konsilo

– Knaboj, mi konsilas al vi, ke dum via vivo vi ĉiam levu al vi demandojn.  
– Kial?

\*\*\*

## Survoje

– Bonan tagon Petro.  
– Bonan tagon Paŭlo.  
– Sed mi ne estas Paŭlo.  
– Kaj mi ne estas Petro.

[http://www.ueci.it/k\\_sento/ks\\_2016](http://www.ueci.it/k_sento/ks_2016)

